

Radio Ĉerizo 10

2011-05-20

Radio Ĉerizo parolas pri tertremoj kaj cunamoj, okazintaj en la 11-a(dek unua) de [la] marto, 2011 (dumil dek unu).

Vi ĉiuj bone konas sur televidila ekrano, kiel kruele atakis nordan Japanion la tertremoj kaj la cunamoj, tute ne atendite. Mi, en la suda regiono, estis en 2(du)-hora kunsido de la lerneja laboro ĉe la tago, kaj tuj post ĝi, vicedro de mia lernejo anoncis per mikrofono, ke oni ne proksimiĝu al marbordo kontraŭ cunamatako. Kaj oni diras, ke post 3(tri) horoj tiuvespere cunamo 80(okdek) centimetra venis al la marbordo de nia urbo, kio kaŭzis nenian vundon.

Laŭ mia kompreno, cunamo estis “ondego”. Post semajnoj, mi rigardis iun trajnofilmon surbendigitan, kaj kiam ĝi proksimiĝis al la konkludo, subite ekrano ŝanĝiĝis al averta anonco, diranta la diversajn tempoj kiam atingos cunamoj al tiuj urboj. Kaj malantaŭ la literoj montritaj ekrane vidiĝis la haveno Mijako, Mijagi-gubernio, kun kvietia mieno de marsurfaco. Sed post kelkaj minutoj maro superajdis la kontraŭondilon tute kviete, kaj sur teron ĝi venis kaj venis kaj venis, kvazaŭ elpuŝite de

la maro, tute senĉese, flosigante aŭtojn, kaj engorĝigante ĉiujn. Kaj jen, sur apuda vojo iom alta, ankorau kuris aŭtoj sen ekkono pri cunamatako.

Ĉe la sceno mi komprenis, ke cuna-mo estas kvietia, sed forta elpuŝo de la maro. Sed vidinte aliajn multajn vidraportojn, ĝi ankaŭ estas mar-ŝvelo, torento, atako, kaj kraŝo laŭ-loke. Ankaŭ ĝi alportis seriozan procezon de la atomcentralo de Hukuŝimo, kion oni ne povis kontroli pro forta radioaktiveco.

Ĉefpolicejo raportis hodiaŭ la nombron de homoj mortintaj estas 15,129(dek kvin mil, cent dudek naŭ), esto-nekonataj 9,034 (naŭmil, tridek kvar), kaj rifuĝintoj kaj evakuitoj 109,688(cent naŭ mil, ses cent okdek ok).

Estis raportitaj multaj belaj, heroaj, kaj korŝiraj rakontoj, kion mi ne havas kuraĝon klarigi detale.

Juna oficistino avertis per mikrofono, ke oni evitu al altaj terasoj. Ŝia patrino klare aŭdis ŝiajn streĉitajn vocojn ripetantajn multfoje, kaj dum anoncado cunamo forviŝis ŝian oficejon, engluante ŝin kaj ŝiajn kamaradojn. Post monato oni trovis ŝin en la maro 10(dek) kilometrojn fore de la lando. Ŝi estis fidela al laboro savi aliajn vivojn ĝis la fina momento.

Teamestro de iu kompanio, gvidinte kelkdek ĉinajn lernovidantojn al alta tereno tuj post forta tertremo, retroiris serĉante aliajn homojn, kaj neniel revenis.

Tute same al instruistino, kiu kondukis al sendaĝera altejo tutajn lernantojn krom unu, kaj kiu reiris al la lernejo por trovi la unu. Cunamo forlavis ŝin.

Multaj alilandaj multkomunikiloj miris kaj raportis pri obeemo de japanoj. En ĉi tiu katastrofo damaĝitoj estis laŭordaj, bonkoraj, kaj cedemaj. Mi sentis ion strangan impreson al ĉi tiu “obeemo” dum monatoj. Mi nun povus aserti, ke ĝi ne estas “obeemo”, sed ĝi estas ago surbazita sur “belo”. Laŭordi estas bele, kaj cedi al pli malfacila homo estas bele. Oni ne forĵetas balaĵojn sur straton. Antaŭ 10(dek) jaroj, korea lernejestro s-ro(sinjoro) Ju miris kaj diris al mi, ke nenio malpura troviĝas strate en Kagoŝimo. Tie ne aperas “mi-unue”eco, kio malkontentigas aliulojn.

Ĉi tiu epizoda okazaĵo estas, ja, ne atentita daŭrigo de japana tradicia kulturo, konsistanta el “belo”, kion reprezentas ekzemple te-ceremonio, florflorado, ĝardenfarado, fajencaĵbakado, k.a.(kaj aliaj), en kio oni metas ion

deforman kontraŭ simetria beleco. Kiel vi opinias?

Mi dankas al vi, aŭskultantoj, precipe sendintoj de zorgaj mesaĝoj. Mi esperas vian daŭran atenton kaj subtenon al Japanio, kaj al japanaj eperantistoj.

Radio Ĉerizo hodiaŭ raportis pri tertremoj kaj cunamoj. Parolis Belmonto el suda Japanio. Ĝis reaŭdo.